

LA NORDAMERIKA

Esperanto- Revuo



Augusto-Septembro 1963

NORDAMERIKA ESPERANTO-REVUO

vol.11, no. 6

DONALD BROADRIBB, Redaktoro

Eldonata de la Esperanto League for North America, 808 Stewart Street, Meadville, Pennsylvania, landasocio de la Universala Esperanto-Asocio.

Kotizoj: Abono, \$3; donacabono, \$2.75; Membreco (inkl. abonon), \$5; Studenta membreco, \$3; specialaj membreckategorioj: subtenanta, \$10; patrona, \$20; viva, \$100; kombinita membreco por geedzoj, \$7.

Adreso: Cion por la Ligo sendu al la adreso donita supre. Komunikojn por la Revuo, librojn recenzotajn, kc. sendu al la redaktoro Donald Broadribb, 51 Primrose St., Moonee Ponds, Victoria, Aŭstralio.

Oficistoj de ELNA: Prezidanto, David Richardson, R.F.D., Box 81, East-sound, Washington, 98245. Vicprezidanto, Francis Helmuth. Sekretario: Conrad Fisher (adreso de ELNA). Kasisto: John Futran, 601 West 164th St., New York 32, New York. **Estraro:** William Glenny, Thomas Goldman, Dorothy Holland, Frans Jahger, James Lieberman, Paul Nace, Jonathan Pool, Robert Runser, Roan Stone.

Fakoj de ELNA: Informsekcio ĉe Thomas Goldman, 7008 Millwood Rd., Bethesda 14, Maryland. Aŭdvida sekcio ĉe H. K. Ver Ploeg, 1908 E. 8th Ave., Spokane 32, Washington. Libro-servo, ĉe ELNA. Administracio de la Revuo, ĉe Francis Helmuth, 5615 Beaumont Ave., La Jolla (San Diego), California. Membreca kaj organiza komitato ĉe Dorothy Holland, 1976 Greenview Drive, Fayetteville, Arkansas. Financa komitato ĉe Forrest Turner, 215 S. 3rd Ave., Maywood, Illinois.


Anoncoj: korespondanoncojn ni presas senpage. Aliaj anoncoj kaj reklamoj: \$10 por plena paĝo, \$6 por 1/2p., \$4 por 1/4p., \$2.80 por 1/8p., 15 cendoj por unukolona linio. Sur la 4a paĝo de la kovrilo, anonco kostas 50% pli.

Artikolojn kaj Librojn Recenzotajn sendu al la redaktoro, Donald Broadribb, 51 Primrose St., Moonee Ponds, Victoria, Aŭstralio. Kalkulu 4 tagojn por aera poŝtendo, 6 semajnojn por mara poŝto. Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la redakcion antaŭ la 1a de la antaŭa monato.

LASTMOMENTE: La Universala Kongreso en Sofio altiris 3400 partoprenantojn el 45 landoj, inter ili 16 usonanoj. S-ino Irwin Burtzloff el San Francisco salutis la malfermon nome de ELNA, kaj raportis, ke la instruista konferenco en Beograd estis aparte sukcesa, kvankam la tertremo en Skopje, nur 300 mejlojn for, forlogis--malgajige--la atenton de la gazetaro. En Usono, aperis interalie bona raporto en Christian Science Monitor... La LKK en Nov-Jorko jam pretigis provizoran programon por 1964; la Kongreso estos ne tri- sed kvar-taga kaj enhavos kromkonferencon "Problemo de Lingvo-Diverseco en Afriko"; plue oni planas postan aerkaravanon al la UK en Hago je eksterordinare favora prezo. Detalojn venontan numeron.

NIA KOVRILLO: En Pitsburgo la fotografilo kaptis Gigi Harabagiu el Rumanujo; Duncan Charters el Britujo; Charles Peterson, kiu prezidis la Kongreson; kaj Elizabeth Collins el Liberio. Foton disponigis tre kompleze la Pittsburgh Post-Gazette.

KONGRESO 1963



En Pitsburgo E.L.N.A. kongresis. Raportas por ni Catherine Schulze.

De la unua momento de konatiĝo, la JEN-anoj kaptis la korojn de ia ELNA-anoj. Ĉu ĉi tiu vere estas la Jaro de la Junularo? Jes, ja!

La heroo de la kongreso? Frans Jahger. Li estis ĉion faranta, ĉiam, ĉie. Li ripozu pace!

Grave estas ke la urbestro de Pitsburgo, S-ro Barr, malfermis la kongreson. Li klarigis, kiel tede estas sidi tra longaj interpretataj konversacioj kiam tagon post tago oni ricevas gastojn de tre diversaj landoj, kiuj aŭ tute ne aŭ malmulte scipovas la anglan lingvon.

Post la urbestro salutis la kongreson eksterlandaj gastoj: Anglujo—Duncan Charters (Junularo Esperanta de Britujo, JEB); Kanado—R. Eichholz kaj S-ro Vadislav; Liberio—S-ino Elizabeth Collins; Nederlando—Ges-roj Rul Damen; Rumanujo—F-ino Gigi Harabagiu; Respubliko de Kameruno—Christopher Atang kaj William Ndumbe (ovservantoj).

Al McDowell, de Channel 2, Pitsburgo, en la plej populara vespera televida informprogramo intervjuis Cathy Schulze kaj JEN-anon Jim May, helpate de Bill Glenny. Li interrompis ilin dum profunda esperanta konversacio sub arboj en la parko kaj faris multajn demandojn pri Esperanto kaj la movado ĉie. Vere profunda estis la interrompita konversacio, ekz.: **Cathy:** Ĉu vi opinias ke tiu ĉi filmisto trafos nian ĝustan profilon, kaj ĉu mia hararaĝo taŭziĝis pro ĉi tiu aĉa vento? **Jim:** Mi esperas, ke oni filmkaptos la verdajn pinglojn sur la brusto.— Vere sukcesis la afero, ĉar kelkaj personoj venis pro ĝi al la publika kunveno kaj kelkaj fraŭlinoj haltigis Jim surstrate petante aŭtografojn (la prezo de steleco . . . speciale, se verda!).

La Pittsburgh - Press - Esperantisto - Raportisto, George Thomas, intervjuis Richard Kollin (JEN), Cathy, kaj Duncan Charters. Aliaj ĵurnaloj kaj radiostacioj intervjuis la fremdajn gastojn.

Per aŭtobuso kaj ŝipo veturis la kongresanoj dum kvin horoj en belega posttagmezo tra la topografie interesa urbo. De la montetoj la pejzaĝo estis senspiriga. Sub la ŝajne centoj da pontoj, laŭ tri riveroj—Allegheny, Monongahela,

kaj Ohio — iris la ŝipo tra la kluzoj por vidi la novajn, brilajn nubskrapilojn de la Ora Triangulo de la nova Pitsburgo. Surŝipe John Lewine alparoladis la publikon pri la Esperanto-kongreso kaj la internacia lingvo. La publiko grand-skale aŭdis multe da esperanta babilado. Trenpiede ni reiris al la hotelo por sinbeligo antaŭ la bankedo, kiam ankoraŭfoje ĉiu esperanta vizago brilegis.

Ho, kia spica kesto! Post bonega festmaĝo, regaloj de Bill Glenni pri iu kvazaŭa lingvo Eksterlingua (cerbinfano de Don Harlow, redaktoro de PLI); deklamado de Gigi Harabagiu "Estas mi esperantisto"; elkora prelego de S-ino Elizabeth Collins, vidvino de antaŭa vic-ministro de Liberio (kaj studentino de William Baff) pri siaj impresoj de la kongreso kaj sia promeso de daŭra laboro por Esperanto post baldaŭa reiro al Liberio; belega deklamado de Karl Nell, el Rochester; serioza prelego de Mark Starr pri la evoluo de socia konscienco; rakontoj de Charles Peterson pri siaj spertoj kiel esperantisto en Antarktiko, la lando de la pingvenoj.

ĉi prezidanto Kennedy?

Subite eksplodis la bombo! Frank Lanzone anoncis: "Gesinjoroj, la prezidanto de Usono, Johano Fo Kennedy!" Eniris la prezidanto (Johano Kooistra, de JEN), kaj komencis "gazetaran konferencon." Sekvis grandega bruo, dum multaj raportistoj ekstaris kaj ekkriis, "S-ro Prezidanto, S-ro Prezidanto." De ĉie en la salonego venis tiuj krioj. La Prezidanto fingromontris al iu.

Demandanto 1: Ĉu vi intencas enkonduki Esperanton en ĉiujn lernejojn de Usono?

Respondo de la Prezidanto: Ne demandu, kion via lando povas fari por vi; demandu, kion vi povas fari por via lando.

Demandanto 2: Ĉu vi intencas ŝanĝi la flagon?

Prezidanto: Nu, jes. Kelkaj steloj estos verdaj.

Demandanto 3: Ĉu vi intencas translokigi la Blankan Domon al Meadville?

kc. kc. ktp. (kiel dirus la Reĝo de Siam).

Duncan Charters, vizitanto el Britujo, tre ĉarme kaj lerte imitis anglan, francan, germanan, italan, japanan, kaj usonan esperantistojn.

Stan Cohen parodie krokodilis tiel spritegan tekston pri la movado ke miaj vangoj ankoraŭ doloras pro troa ridego.

Serenadis nin la JEN-anoj, akompanate de piano kaj gitaro: Dennis Banash, Joseph Chagnon, Duncan Charters, Stan Cohen, Richard Kollin, John Kooistra, Frank Lanzone, Ellen Lewis, Jom May, Lois Shapiro, Joel Silverman, Ges-roj Yuhasz. La melodioj: "Valsu Matildo" (pro kio dankas nia saltema redaktoro) kaj "Ĉu vi Ŝatas la Rok' kaj Rul'?"

Granda surprizo estis trupo de 20 bulgaraj popoldancistoj en belaj kostumoj, kiu sprite dancis por doni antaŭsenton pri Sofio.

Tiel finiĝis la plej gaja vespero de mia esperanta vivo.

A Plea to Language Makers



After trying to understand all the special personal projects for a new and improved international language, from Jespersen down to Gode and Hogben, I feel moved to make a special plea to them. Naturally in every free country each language specialist has the right to criticize the alleged failings of Esperanto and to attack the particular words or forms which offend their own personal taste. In the private study of the inventor he has the privilege of exulting in the theoretical superiorities of his brain-child which will, he thinks, demonstrate the superiority of his own scholarship. But why not store it with his private papers so that his biographer can have fun in proving the superiority of the deceased?

Some of the inventors, e.g., Dr. A. Gode, dismiss as foolish idealists and Utopian dreamers those of us who work for an international auxiliary tongue for the common people. All that is needed is a code of Latin-derived words to summarize medical and scientific articles for the elite. Yet there are proponents of international language who share the aim and hope of the Esperantists, that to sweep away the barriers of lingual diversity would make possible mutual understanding and appreciation between people which would immeasurably benefit the world. It is to these I appeal.

Every new pet project makes it a little harder to recruit students for the only world auxiliary language which is actually functioning as such and which has proved its worth in conferences, travel, literature, science and in every realm of human activity. Esperanto is not backed by a system of universities, nor grandiose enough for big foundations to subsidize. The tens of millions of dollars spent by the U.S. Government and that of the United Kingdom to teach English are missing for the instruction of Esperanto. No cultural imperialism, conscious or otherwise, no vested interests of English college departments promote the auxiliary language.

So, dear professor, when you come with just another pet project, you make it harder for the Esperanto movement to get people interested and to take the time and energy to learn to use Esperanto. The man in the street says: "when you specialists have decided which language is really best, then I will learn it, but until then why should I gamble?" Admittedly some of the reforms which you propose are not just your personal taste. (And all of us have our personal likes and dislikes.) Why not hold the reform proposals until at least two or three governments, or the United Nations, have declared for the teaching of Esperanto as, say, the first foreign language in the schools? Then let the Academy, which will include experts in language from the East as well as the West, judge those

reforms in the light of modern world usage. The professor who puts human understanding and world co-operation above his petty ego-centric impulses will surely be prepared to postpone the short-lived notoriety given to every new language proposed. If he really cares for the greater aim of human welfare, he will listen to this plea.

—MARK STARR



Esperanto News Of The Month

School and University courses in Esperanto are increasing in number almost every month. Recent additions include a new chair of Esperanto at the University of Goias, Brazil, and a three year experimental program of teaching Esperanto in Guatemala City, Guatemala.

Tourists in Novi Sad, Yugoslavia, may now undertake officially guided tours conducted in Esperanto, from the Tourist Union.

The West German government recently awarded its "Bundesverdienstkreuz am Bande" to Hans Tressel, a Universal Esperanto Association delegate in Munich, for his work in Esperanto.

The Tutmonda Esperantista Junular-Organizo, an association of Esperantist Youth, report that they were seriously approached by the Centro Traduzioni e Servizi di Congresso (claimed to be Europe's largest translation agency specializing in international meetings), with an offer to set up translation services for their current convention. Rather a pity to have to turn the offer down!

Two \$500 travel scholarships open to elementary school teachers in San Mateo and Santa Clara (California) counties have been offered. Beginning in September, a teacher-training program will run through May. The scholarships will cover registration at the International Esperanto Convention, 1964, at The Hague, Netherlands, a week at the Gresillon Center (France), and other important events. Information is available from the Peninsula Esperanto League, 410 Darrell Road, Hillsborough, California.

A new film from Norway, with Esperanto text, has been announced. Running fifteen minutes, this 16mm color film has been put out by the tourist association of Oslo.

The Astronomical Observatory in Zagreb, Yugoslavia, has begun to publish a new quarterly magazine in Esperanto, titled **Homo kaj Kosmo**. As might be expected, the first issue is largely devoted to popular articles on astronomy, though the topic of artificial satellites is also prominent. Subscriptions cost \$1.50.

La Universalaj Kongresoj

Oni povas uzi Esperanton por korespondado, por turismo, por legi librojn kaj gazetojn, por lerni lingvistikon, sed ofte oni volas uzi Esperanton por amuzo, kaj por konversacii. La Universala Kongreso de Esperanto estas unu metodo por efektiviĝi tion.

La Universalaj Kongresoj originis en 1905, kiam okazis la unua ĝenerala kunveno de Esperantistoj el la tuta mondo, en Boulogne-sur-Mer, Franclando. En tiu kongreso, la esperantistoj akceptis la fundamentajn dokumentojn de la lingvo (La **Fundamento de Esperanto**, libro de lingvaj reguloj, kaj la **Deklaracio pri la Esenco de Esperantismo**), kaj ili komencis la kutimon kunveni en ĉiu jaro dum unu semajno. Nun en tipa Universala Kongreso okazas dramoj, filmprezentado, sciencaj prelegoj, bankedo, ekskursoj, balo, kaj aliaj distraj aferoj, por amuzi kaj instrui la partoprenanton, kaj ankaŭ okazas serioza diskutado pri la Esperanto-movado, oni preparas planojn por la venonta jaro, instruas kurson por Esperanto-instruistoj, kaj multaj Esperanto-societoj uzas la okazon por speciale kunveni.

La Universala Kongreso estas sendependa organizo, kaj ĉiu esperantisto en la mondo rajtas partopreni. La praktikan preparon de la kongreso faras la Universala Esperanto-Asocio. En 1963 la Kongreso okazas en Sofio, Bulglando.

Kongresoj — conventions

Oni — one

povas — can

uzi — use

por — for

korespondado — correspondence

turismo — tourism

legi — to read

librojn — books

sed — but

volas — wants

kaj — and

estas — is

unu — one

efektiviĝi — to realize

tion — that

kiam — when

okazis — occurred

unua — first

kunveno — meeting

el — from

tuta — entire

mondo — world

en — in

tiu — that

lingvo — language

pri — concerning

ili — they

kutimon — custom

ĉiu — every

jaro — year

dum — during

semajno — week

nun — now

tipa — typical

prelegoj — lectures

bankedo — banquet

aliaj — other

distraj — entertaining

partoprenantojn — participants

ankaŭ — also

diskutado — discussion

movado — movement

venonta — coming

instruistoj — teachers

sendependa — independent

rajtas — has the right

faras — does

Memore pri Edmond Privat

Estas jam unu jaro post la morto de D-ro Edmond Privat. Sed mia memoro pri li estas ĉiam freŝa.

Nun estas la profunda nokto. Mi refoje foliumas lian verkon **Vivo de Zamenhof**. Kiom da fojoj mi jam legadis ĝin! Ĉiufoje, legante ĝin, mi sentas plifirmiĝi mian fidon je Esperanto. El tiu ĉi eterna fonto mi ĉiam elĉerpas la forton:

En Genevo, tiu svisa kosmopolita urbo, Privat ekvidis la lumon en 1889. Jam dum la fruaj knabaj jaroj naskiĝis la homama ideo en lia juna koro. En 1903, kiel 14jara knabo, li eksciis pri Esperanto, kaj tuj fariĝis ĝia adepto. Li fondis kun sia kunlernanto Hector Hodler, kiu poste fariĝis prezidanto de UEA de 1918-1920, la gazeton **Juna Esperantisto**, kaj komencis korespondi kun D-ro Zamenhof. Du jarojn poste, li partoprenis la unuan Universalan Kongreson de Esperanto en Boulogne-sur-Mer, kaj surprizis eĉ D-ron Zamenhof mem per sia elokventa parolado. Sendube lia persona konatiĝo kun D-ro Zamenhof multe influis lin. En la poemo "Saluto al Zamenhof" li tiel benas Esperanton kaj ĝiĝan kreinton:

Al ĉiuj popoloj benatan donacon
vi faris trafante la vojon plej
bonan:
en korojn de l'homoj eksemis vi
pacon,
sur lipojn semante la lingvon
belsonan.

Nun kreskas en mondo spirito
homara
kaj iom el via inspiro anima
per ĉiu parolo de lingvo la kara
en koroj ekfloras al vivo senlima.

Privat ekverkis! Kiel ĉiu genia verkisto, li ekverkis en la plej junaj

jaroj, des pli rimarkinde, ne en la gepatra lingvo — la franca, sed en Esperanto. Lia unua dramo, **Genevra**, la unua el la unuaj dramoj en Esperanto naskiĝis, kiam la talenta aŭtoro estis nur 19jara junulo. En 1925, la 17a UK okazis en Genevo. Nia granda verkisto kaj poeto Julio Baghy prezentis tiun ĉi dramon al la internacia publiko, kaj la sukcesoj estis grandegaj. Pri tiu ĉi rara okazintaĵo Baghy skribis post multaj jaroj:

"... Foliumante nun la reĝisoran ekzempleron, antaŭ mi reskiziĝas la rolantoj, diversnaciaj geaktoroj, kies arta ludo sukcese interpretis la poeton, kiun la entuziasma aplaŭdado de la publiko plurfoje vokis antaŭ la lampojn..."

(el la antaŭparolo al **Junaga Verkaro** de Edmond Privat, eld. 1960 de Stafeto.)

Kiel talenta verkisto, poeto, eseisto, historiisto kaj esperantologo, Privat dediĉis sin tute al Esperanto jam en la junaĝo. Liaj signifoplenaj verkoj aperis unu post la alia: **Ĉe l'Koro de Eŭropo**, 1909; **Pri Esperanta Literaturo**, 1912; **Tra l'Silento**, 1912; **Historio de Esperanto**, Vol. 1 1912 kaj Vol. 2 1927; ktp. Oni ne forgesu, ke la supremenciitaj verkoj aperis, kiam la aŭtoro ĵus spertis sian 20an jaron!

Sian mirindan oratoran talenton li elmontris unufoje en la unua UK en 1905. Liaj brilaj studoj ĉe Sorbonne kaj en Genevo kaj pluraj honoraj titoloj pliiĝis lian bonfamoni en Esperantujo kaj ekster ĝi. Li fariĝis profesoro kaj doktoro de historio, prezidanto de UEA (1924-1928), de Svisa Esperanto-Societo kaj de Universala Ligo (ĝis sia morto), reprezentis Esperanton en pluraj internaciaj konferencoj.

Li estis persona amiko de multaj intelektuloj, i.a. de D-ro Zamenhof, de la iama ĉeĥoslovaka ministro por eksterlandaj aferoj D-ro Edward Benes, kaj de la mondfama hinda pacifisto Gandhi, kiun li akompanis al Hindujo en 1931. Krome, li estis ankaŭ persona konato de la uzona prezidanto Theodore Roosevelt, kiun li vizitis dum sia prelegvojaĝo tra Usono en 1908. Al prezidanto Roosevelt li parolis pri Esperanto.

La grandegaj kontribuoj de D-ro Privat al Esperanto estas nemezur-eblaj per simplaj vortoj. Li estis ne nur granda esperantisto, sed ankaŭ granda humanisto kaj pacifisto. En 1951 lin oni elektis Honora Prezidanto de UEA.

Dum la lastaj jaroj de la vivo, lia sanstato pli kaj pli malboniĝis. Pro malsano li ne povis ĉeesti la lastjarajn UK kaj povis kontakti la mondon ĉefe nur skribe.

Kiam en oktobro de 1962, la funebra sciigo pri lia forpaso min atingis el Bruselo, dum momento mi ne volis ĝin kredi vera. Mia koro ekremis dolore, miaj okuloj malsekiĝis. . . .

La 2an de januaro de 1963, mi ricevis tute neatenditan registritan flugleteron el Svislando. Mia rigardo ektuŝis la nomon de la sendinto: S-ino Yvonne Privat, la kompatinda vidvino. Kun emocio mi malfermis la leteron, kaj el ĝi glitis granda bildo de D-ro Privat, volvita zorge en celofano. La bildo estis akompanata de dupaĝa permene skribita letero de S-ino Privat. Legante ĝin, mi ne povis elteni mian emociion. La letero estis datita la 21.12.1962 en Neuchatel:

Kara ĉina samdeano,

Permesu al mi, kiel edzino de Edmond Privat, danki al vi tutkore pro via bela letero de simpatio adresita al svisaj samideanoj.

Kun granda emocio mi legis vian mesaĝon en la Svisa Espero.

Ke vi, malproksima amiko de nia movado, partoprenas tiel korfunde en nia granda doloro estas por ni, por mi precipe, kuragiĝa helpo kaj dolĝiga konsolo.

Mia edzo, grave malsana jam de pluraj jaroj, tamen neniam rezignis daŭre labori por nia movado kaj por paco malgraŭ teruraj doloroj.

Dum siaj infanjaroj, li havis en sia koro grandan amon al paco.

En 1903, dekkvarjara knabo, li eksciis pri Esperanto kaj tuj rekonis ĝian valoron por interfratiĝo tutmonda. La interna ideo de Zamenhof trovis eĥon en lia animo kaj entuziasmiĝis lin.

De tiu momento li rapide lernis la lingvon kaj post nelonge instruis Esperanton kaj prelegis pri ĝi.

Kiel vi scias, li havis la feliĉon plurfoje renkonti D-ron Zamenhof kaj amikiĝi kun li. Tio havis fortan influon sur mia edzo.

Pli bone ol ĉiuj mi povas atesti lian sindonon kaj dediĉon al Esperanto.

Nun estas en preparo eldono de libro pri liaj personaĵ rememoroj **Aventuroj de Pioniro**, kiu espereble baldaŭ aperos.

Mia edzo tre ĝojus scii, ke la E-movado pli kaj pli progresas kaj vigliĝas en Ĉinio, kaj ke liaj penadoj ne estis vanaj.

Dankon al vi, reprezentanto de la juna generacio en via lando, pro via entuziasmo al nia sankta afero.

Plej kortuŝita mi sendas al vi amikajn bondezirojn por Novjaro kaj svisan saluton.

(Aldono: unu el la lastaj fotoj de mia edzo, D-ro Edmond Privat) (Kun dediĉo de S-ino Yvonne Privat: Al S-ano Armand Su, memore de D-ro Edmond Privat, profesoro en Neuchatel, Svislando, 1889-1962).

Mi sendis tuj dankleteron al S-ino Privat pro ĉio sendita kaj dirita. Sed ĉu povas unu letero esprimi tutan mian dankon, kiun mi ŝuldas eterne al D-ro Privat kaj al lia kara familio? Ne!

Senkonscie mi ekmemoris pri liaj vortoj en **Vivo de Zamenhof**: "Li tamen amis ĉiujn nin. Li lasis al ni devon: konigi **tutan** lian proponon al homaro."

IKUE

INTERNACIA KATOLIKA UNUIGO ESPERANTISTA

Jus aperis la tri unuaj IKUE-broŝuroj en la nova serio **Kristana Kulturo**—unu el la iniciatoj okaze de la 60-jara ekzisto de la oficiala revuo **Espero Katolika**. La titoloj de la broŝuroj estas:

1. Emile Peltier
apostolo de katolika esperantismo. Biografio (ilustrita), verkita de N. Hoen
2. Sintrompoj
el la germanlingva originalo de sac. prof. Johann Baptist Hirscher tradukis sac. W. Flammer
3. Pacem In Terris
la fama ekumena Encikliko de la ĵus mortinta Papo Johano XXIII, la Papo de la Dua Vatikana Koncilio

Prezo: po 6 steloj. Mendu de IKUE, Nicolaas Beetsstraat 146, Heerlen, Nederlando.

La plej malnova esperanta gazeto **Espero Katolika** aperas monate. Subtenu kaj fariĝu membro de IKUE. Kotizoj: \$2.50 por membroabonanto, \$1.00 por membro-jarlibro. Usona peranto: S-ino William McGrogan, 2109 Parkwood Drive, N.W., Warren, Ohio. Kanada peranto: C. R. MacDonald, 9445 Millen Ave., Montreal 12, P.Q.

L^e rnu vortoJz

Cu inundi signifas:

- a. malkvietiĝi, kiel la ondoj de la maro?
- b. forflugi, kiel birdo?
- c. kanti trankvile al si?
- ĉ. kovri per superfluo da akvo?

Cu embaraso estas:

- a. sento de honto, pro ia ago?
- b. situacio el kiu oni ne povas facile iri?
- c. longa starado en vico?
- ĉ. balustrado?

Cu kompromiti signifas:

- a. endanĝerigi personon?
- b. fari decidon, kiu estas meze inter du pridisputataj deziroj?
- c. promesi geedziĝi?
- ĉ. skribi artikolon por ĵurnalo?

Cu kamero estas:

- a. senfenestra ĉambro?
- b. maltrankviliga sonĝo?
- c. granda domo?
- ĉ. ruĝa flago?

Cu hejti signifas:

- a. kribi "Saluton!"?
- b. varmigi ĉambron?
- c. nomo de insulo sude de Usono?
- ĉ. konservi fruktojn?

Cu risorto troviĝas en:

- a. zoologia ĝardeno?
- b. brakhorloĝo?
- c. loko apud la marbordo, kiel feriloko?

Respondojn trovu sur paĝo 139

LA KOMENCO DE L'MONDO

Tiu ĉi drame streĉa antikva ĉina legendo, kiun nia juna azia kunlaboranto poeziiĝis, kun la optimismaj finversoj estas konvena enkonduko de tiu ĉi printempa numero.

*En la komenco nia mondo.
ekestis kvazaŭ ovo granda.
Ekzistis do nek mar' nek monto,
nur la kaoso prakonstanta.*

*Prapatro nia, virkoloso:
La sankta Panko lin nomas oni
De la komenco en kaoso
li ekis ĝermi kaj burĝoni.*

*Naskiĝis Li kaj malrapide
dum longa temp' li sin etendis
en dolĉa dormo. Sed subite
ekvekan vokon li eksentis.*

*Nun Li per okulpar' avida
bedaŭre vidis nur nenion
krom la mallum'. Do Li tedita
decidis krei harmonion.*

*Hakilon prenis Li de ie
kaj la mallumon forte hakis.
Kun tondra bruo kolizie
la granda ovo dise krakis.*

*Tuj la malpeza materio
leviĝis alten kaj la helo
aperis de la galaksio
kaj estis preta la ĉielo.*

*La peza, miksa elemento
iom post iom sube marĉis,
ĝi iĝis seka de pravento.
La temp' ankoraŭ ne ekmarŝis.*

*Li poste staris sur la tero,
ĉielon tenis per la kapo
plenfirme, por ke la danĝero
ne falu teren kun mortfrapo.*

*Solece kaj senmove staris
Li, spite al la lac', doloro.
(Ho, kian Li miraklon faris!
Lumigu lin la dank', memoro!)*

*Longtempo pasis for. La tero
kaj la ĉiel' jam estis firmaj
sed la koloso en la sfero
seniĝis jam de fortoj ŝirmaj.*

*Post la longdaŭra kre-laboro
ripozon ankaŭ li deziris.
Li ekkŭŝiĝis kun langvoro
La viv' foriris. Li martiris.*

*El lia lasta, laca spiro
fariĝis nuboj kaj la vento
kaj la stertor' de l' giganta viro
kreskis je tondra firmamento.*

*Okulo dekstra iĝis suno,
kaj la alia — milda luno,
brakoj, piedoj — grandmontaro,
la sango jen rivero, maro.*

*La vejnoj iĝis vojoreto,
el karno lia: tero, humo
hararo blanka: altkometo,
la haŭt' foliarbar' en zumo.*

*Prapatro nia, granda Panko
donacis grace harmonion,
ne estas ve, ne estas manko
al Li ni danku ĉion tion.*

CONVENTION IN PITTSBURGH

The Esperanto League for North America met in convention at Pittsburgh, Pennsylvania, in the Pick-Roosevelt Hotel, July 4-7. There were members from all parts of the United States, from Canada, and from several foreign countries.

The opening meeting on Friday was addressed by the Mayor of Pittsburgh, who mentioned his own experiences with the difficulty of having to conduct conversation through translators. Presided over by Charles Peterson, of Downey, California (in the absence of the president of the League, David Richardson), the convention session then was introduced to the foreign visitors from Great Britain, Canada, Liberia, Holland, Romania and Republic of Cameroon; letters and telegrams addressed to the convention were also read. Various items of business ensued:

The treasurer of the League reported a balance of \$2,376.46 which is approximately 500 more than last year.

Mark Starr spoke regarding the establishment of a League Press Service, a central office, and seeking foundation financial aid.

Other Friday business items: playing tape recorded greetings by the president, David Richardson. Convention committees were named.

Dr. Thomas Goldman told of the work of the Publicity Committee, which has produced a new folder A Language for the Jet Age, and which plans for the future a series of publicity articles underlining the practical value of Esperanto for travel, a contest for English-language articles on My Most Interesting Esperience with Esperanto, and a network of local public relations representatives.

The work of JEN (Young Esperantists of North America), and of individual members was discussed (one youth, Tom Davidson, Portland Oregon, was elected Esperantist of the Year).

John Lewine, from New York, spoke on publicity efforts for Esperanto among non-Esperantist conferences on language problems.

Saturday, the convention was told of plans for a visit to the U.S. by two Japanese Esperantists in October. Their travel plans are being coordinated by Conrad Fisher and Catherine Schulze.

An invitation tendered from New York for the 1964 convention was unanimously accepted, with a suggestion that it be held later in July, to allow members to travel directly from there to the Hague, Holland, for the Universala Kongreso.

Sunday, the Ballot Committee reported the results of the election of officers of the League. 122 votes had been cast, of which three did not comply with the requirement ensuring League membership, and six were otherwise invalid. The results were:

For President:

Richardson	62
Lewine	36
Doneis	24

For Vice-President:

Helmuth	78
Stone	45

For three Executive Committee vacancies:

Schulze	92
Runser	73
Glenny	68
Pool	57
Regal	45
Pollock	30
Fisher	1
Harmon	1

Pool, Fisher, and Harmon had not been listed on the ballot, but were write-in candidates.

David Richardson was declared: elected President, Francis Helmuth Vice - President. Also: Catherine Schulze, Robert Runser, and William Glenny members of the Executive Committee.

Catherine Schulze had requested earlier to have her name withdrawn from the ballot, stating that she had accepted candidacy only because there had been difficulty in finding nominees. Upon seeing the long list of capable persons, she wished to withdraw, since she had already served several years, and could now better serve by devoting her time and energy to the school program currently being undertaken in San Mateo County, California. She therefore tendered her resignation and the convention voted to accept Jonathan Pool in her stead, since he had received fourth place in the voting.

Among the resolutions adopted one requires special notice, that which expresses approval to the plans of Mr. and Mrs. Murray for contacting schools during their coming travels, with the intention of urging these institutions to accord Esperanto the same status as that enjoyed by the other languages which they teach.

The Finance Committee presented a report summarized below. The critical need for extra financial support from the membership was stressed, to allow further development of League activities and the new monthly schedule of the Review.

OUR APOLOGY

This issue of the Review has been delayed owing to the absence of our printer Rudiger Eichholz, who is attending the U. K., in Sofia. Plans to publish the August issue during his absence could not be fulfilled.

The October issue of the Review will be specially devoted to the subject Esperanto in the Schools.

FINANCA RESUMO

Dum la periodo Nov. 15, 1962 tra Jul. 1, 1963 (kiam oni komencis novan financon jaron), 251 membroj pagis sian kotizon, kaj 27 abonoj estis pagataj, krome 45 donacabonoj. Donacoj, vendoj, kc. altigis la sumon al \$2,166.00 al kiu estas aldonenda saldo raportita de la antaŭa kasisto, \$1,847.22. Do sume, \$4,013.33.

Elspezoj estis \$1,636.87 por la Revuo, liga administracio, stoko de aermarkoj, kc.

Saldo: \$2,376.46.

La kongreso adoptis raporton, ke en 1964 la ligo elspezu por la Revuo \$x nombro da membroj je la 1a de januaro, 1964, plus iuj donacoj destinitaj por la Revuo. Oni reviziu la kalkulon post ses monatoj.

La LKK de la kongreso raportas (en sia provizora raporto) saldon de \$49.62 post pago de kosto de la kongreso.

Esperantisto de la Jaro

La Esperantisto de la Jaro estas juna viro, Tomaso Davidson, de Portlando, Oregono. Lin oni elektis dum la kongreso en Pitsburgo kvankam pro la longa distanco li ne povis mem partopreni kongrese.

Tom Davidson estas 19jara. Li komencis lerni Esperanton en 1961. Poste, kiam oni decidis komenci kurson en la portlanda universitato, li helpis pri la instruado. El la kurso kreskis klubo, ESPO. Nun, en 1963, komence de septembro li komencos kurson en la Portland Community College.

Dum la aktuala somero Tom, kun S-ino Ruto Culbert, okazigis la unuan Pacifik-Nordokcidentan Esperanto-Kunvenon, kiu tre sukcesis. Poste, li iris al Medfordo, Oreg-




Above: Official photo

Left, 1 to r: Donald McClellan, Convention Committee chairman; Josep Barr, Mayor of Pittsburgh; Charles Peterso vice-president of ELNA Armin Doneis, Executive Committee chairman.

Right above: Mayor Barr with Frans Janger and Donald McClellan.

Lower right: Folk-dance highlighted the banquet





ono, kie li propagandis multe por Esperanto: li parolis per sep radiostacioj, unu televidostacio, kaj prelegis dufoje po 2 horojn.

Kiam Tomaso ne okupadas sin pri Esperanto, li estas studento en Portland State College, kie li studas la germanan, rusan, kaj la hispanan lingvojn, por poste lincee instruadi.

INSTRUISTA KUNVENO

Roy kaj Dorothy Holland estris la instruistan kunvenon. Partoprenis pli da personoj, Roy kaj Dorothy estis unuanime reelektataj prezidanto kaj sekretario. Same unuanime, Ida Belle Craig estis elektata redaktoro del' Eduka Bulteno, kaj Robert Runser la nova kasisto.

Catherine Schulze demonstraciis instruilojn por infanoj kaj plenkreskuloj. Oni vigle vendis la tre uzindan tezon de Lavina Parson An Esperanto Course for Elementary Schools. Sekvis diskuto pri edukaj bezonoj kaj celoj.

Kiel kutime, oni bezonis multe pli da tempo por tiel grava kunveno. En la posta kongreso oni ne pre ebligu tion: ekzistas multa intereso, kaj konstante ni bezonas pli kaj pli da kompetentaj, spertoplenaj instruistoj.

JUN-JEN

JUN-JEN: fenomeno nova aperas pro la instruado de Esperanto en la elementaj lernejoj. Oni bezonas novan fakon en JEN por la frulicea studento. Ideojn kaj nomojn sendu al Richard Kollin, 30 Ave. B. New York 9, N.Y.

zip!

Tro malfrue por la presado de la kovrilo ni lernis la novan zipnumeron de ELNA: 1 6 3 3 5. Bonvolu parkeri tion, kun la propra.

newspapers

Due to the convention, and a flurry of activity elsewhere, a number of newspaper articles relating to Esperanto deserve special notice:

The PITTSBURGH PRESS on July 7 published a three column article, with picture, inspired by the convention; on July 12, a second item (with drawing) was published. Both were excellent reports.

The PITTSBURGH POST-GAZETTE, on July 6, published a short article in Esperanto reporting the convention, followed by English translation and a large photograph.

Most spectacular of all comes an item whose significance is not easy to judge. In the PITTSBURGH PRESS on July 28 appeared a half-page ad for "Esperanto furniture," a design said to be inspired by the language for which it was named.

The WALNUT PARK NEWS (Portland Oregon) reported, June 19, that a thousand dollar Jackson Foundation scholarship to Reed College has been given to Peter Dvorak, whose activities include the Jefferson High School Esperanto club.

The Spokane DAILY CHRONICLE on June 26 reported the visit of our British Esperantist friend W. L. Simpkins, who subsequently appeared on Channel 4 television.

The TAMPA TRIBUNE, June 27, after commenting on the new Zip-system, published a limerick from George E. Wagner, in English and Esperanto, deserving of mention here, as printed:

A Jolly young fellow from Lister	Junulo de-erbe Vobiso
Met a young lady and kissed	Salutis fraulinon per kiso:
her:	Unue ŝin mtris,
Surprise turned her head,	Tiam ŝin dtris:
Then quickly she said:	"Mi havas la tempon por biso."
"I've time for another one	
mister!"	

The Spokane SPOKESMAN-REVIEW on July 14 published a long article, with photograph of the ELNA audiovisual aid director H. K. ver Pl-oeg.

ORBITO

Eld. D.W. Hoffman, 1444 Leslie St. Hillside, New Jersey, 07205, USA. Abonprezo: unu dolaro.

Pli precize cirkulero ol gazeto, Orbito havas nur 2p., tre dense presitajn. Tiujn 2p. plenigas tre interesaj artikol(et)oj pri Usono. Ekzemple, en unu numero estas tre detala raporto pri Telstelo (en la angla: Telstar), kaj komparo de la produktado de la USSR kun tiu de Usono. En alia numero, ni legas pri la vivstato en Usono, stacio 13 en New York, kaj pri rimarkinda domstrukturo, i.a. La folioj meritas legon. Ni deziras al la eldonanto bonan sukceson.

FROM EUROPE

Another most successful week of Esperanto School has been completed in Helsingors, Denmark. The session was held in the International High School, a center dedicated to better world understanding.

There were around 100 in attendance, with 4 from the U.S., all from California and en route to the International Esperanto-Convention in Sofia.

Most of the group came from the nearby Scandinavian countries but also present were people from Holland, Belgium, Germany, and Switzerland. It was most gratifying to see the large number of young people present. There were four divisions of classes, so each could choose according to his proficiency.

Similar schools are being held in France, England, and Switzerland, while in many countries sessions are held specifically for their own people. Parents seem most concerned that their children learn this useful neutral common language.

It would be a wonderful idea if similar schools could be formed in the U.S., perhaps one in each section, in order to accomodate most people.

Mary Murray



el monda kulturo



Francisco Azorin:

LETERO DE ZAMENHOF

Mi ekkonis persone Zamenhofon en 1909, okaze de la 5a Universala Kongreso, en Barcelono. Sed tiam okazis tie **pacema** revolucio kontraŭ afrika-milito kaj al mi, junulo senpripensa, tio interesis pli ol sekvi Zamenhofon. Poste, okaze de la 16a Universala Kongreso en Vieno, mi interrilatis kun Klara Zilbernik, la vidvino, kaj kun Lidja la filino de ambaŭ, kiujn mi invitadis mangi kun mi en mia hotelo tiea. Nature, tie ni multe parolis pri Esperanto kaj pri **nia** Zamenhof. Sed la temo hodiaŭa estas alia.

En mia arkivo mi konservis du leterojn de Zamenhof. La unua perdiĝis kiam mi ĝin pruntis, la duan mi konservas kiel trezoron. Ĝi estas aŭtentika, aŭtografa, manskribita de Zamenhof mem. Ĝi ne estas publikigita en la **Originala Verkaro de Zamenhof** (kolektita de Dietterle), nek en la duvoluma **Leteroj de Zamenhof** (eldonita de Waringhien). Sekve, ĝi estas tute nova. Jen ĝi:

D-ro L. Zamenhof
Varsovio
str. Dzika No. 9.

12/1907

Tre estimata Sinjoro!

Responde al Via letero de 21a de (?) Februaro mi sciigas Vin, ke la lingvon anglan mi posedas tre malbone kaj tial mi ne kuraĝas fari publikajn tradukojn el tiu ĉi lingvo, pro timo, ke mi eble faros eraron. Libere traduki mi povas nur el la lingvoj rusa, pola, germana aŭ franca. El lingvo angla mi povas traduki nur en tia okazo, se mi havas antaŭ la tekston de la tradukota artikolo ankaŭ en ia alia lingvo, por ke mi povu kompari kaj gardi min de eraroj.

Via

L. Zamenhof

La letero havas intereson, kiel ni vidas, eĉ kuriozecon sintaksan. En la perdita letero li diris, ke li povis traduki ion el hispana lingvo, pere de vortaro.

ĈU VI DEZIRAS HELPI?

Multaj membroj kaj abonantoj malfruas pagante sian kotizon, tiel ke ĉiunumere ni devas elsendi ekzemplerojn por kiuj ni ankoraŭ ne ricevis pagon. Se vi deziras helpi la regulan aperadon de la Revuo, ĉu vi bonvolos:

- ? (a) certigi, ke vi pagis vian kotizon akurate
(b) serĉos, kun ni, novajn abonantojn kaj membrojn
(c) donacos laŭeble al la Revu-kaso (indiku tiun celon, kiam vi sendos vian donacon al la kasisto). Dankon.

L. ZAMENHOF

VARSOVIO

str. Dzika № 9.



12/14 of

Tre estimata Lingoroj:

Responde al Via Letero de
21^a de Februaro mi sciigas Vin,
ke la lingvon anglan mi posedas.
Tre malbone kaj tial mi ne kurafas
fari ^{publikajn} tradukojn el tiu ĉi lingvo,
pro timo, ke mi eble faros eraron.
Libere traduki mi povas nur
el la lingvoj rusa, pola, germana
aŭ franca. El lingvo angla mi
povas traduki nur en tiu ordo,
se mi havas antaŭ la tekstoj de
la tradukota artikolo aŭkaj
en la alia lingvo, por ke mi
povu kompari kaj gardi min de
eraroj.

Via
Zamenhof

JUNULARO ESPERANTISTA DE NORDAMERIKO

Sendependa organizo aliĝinta al
TEJO.

ANTAŬ- KONGRESO

7-9 JUNIO, 1963

Kia sukceso la JEN Antaŭ-Kongreso estis!! Pli ol 30 junuloj esperantistaj ĝuis la ĉiu-momentan aktivecon de la tri-taga afero. Festantoj venis el Bostono, Novjorko, kaj aliaj lokoj por la suno de Fajr-Insulo (Fire Island) kontraŭ la marbordo de Long Island, Novjorka ŝtato kaj por la Esperantumado.

Kompreneble, la lingvo por la festo estis Esperanto, kiu estas uzata de la plimulto ĉiutage iuokaze, kaj estas rimarkinda ke eĉ la komencantoj ekuzis la lingvon por ĉia komunikado. Sur la strando Joel Silverman spertulo en Esperanto kaj longtempa Esperantisto kondukis seminarion por la Esperant-parolantoj pri kelkaj implikaj aferoj en Esperanto. La seminario okazis tute ne formala kaj ĉiu estis en banvesto k.t.p. Aliloke, alia malnova Esperantisto, Humphrey Tonkin, gvidis alian seminarion por komencantoj. Ambaŭ seminarioj estis trege sukcesplenaj. La seminarioj daŭris tri horojn kaj sabate kaj dimanĉe; estis nekredebla la kvanto da Esperanto kiun lernis la komencantoj post la seminarioj.

La studado estis nur eta parto de la festo. Ĉiuj amuzis sin diversmaniere. Dum la hela tago la homamaso kriis "ek al la mar!" kaj ekis por naĝo kaj sunbano. Vespere, la plimulto kantis, akompanita de Joe Knowles, gitare, por Esperantaj, JENaj, kaj aliaj kantoj. En malhela angulo de la ĉambro ĉiame estis ŝakludo.

La festo okazis en grandega domo de la geavoj de Jonithan Pool. La geavoj donacis manĝaĵojn por la ĉeripozantoj kaj dormlokoj estis trovitaj per ĉiuj en la subtegmento, verando, kelo, kaj sur la plankoj, divanoj, kaj litoj. Tutcerte, manĝaĵ-

oj, trinkaĵoj, parolado, muziko, kaj diversaj ĝuigaĵoj abundis. Sukceso estas la nura vorto!

ATENTU!


La 10an de Junio, fondiĝis grava Esperanto-organizo, kun la celo reklamadi kaj lernigi Esperanton tra la anglalingvaj partoj de la mondo. Jen la nomo kaj adreso de la organizo:

Esperanto Education Center,
Post Office Box 406,
Cooper Station,
New York 3, New York.

Ek de nun, la EEC prizorgos la vendadon kaj de la Teach Yourself Esperanto Kit kaj de la Harvard Esperanto Club Correspondence Course. La EEC servos ankaŭ kiel informcentro pri Esperanto kaj pri iloj por lerni ĝin.

Do, se vi aŭ iu alia deziras mendi la korespondkurson aŭ la kompletan, aŭ se vi aŭ iu alia deziras informon pri aliaj manieroj lerni la internacian lingvon, bonvolu turni vin aŭ lin ĉiam al la EEC!

Por membriĝi en JEN: jarmembrec (inkl. abonon al la JEN-bulneto) kostas \$1.00 aŭ egalvaloron. La organo daŭre aperos almenaŭ dumonate, kaj ni esperas povi fari ĝin monata. Persono pli ol 30 jara povas pagi unu dolaron por abono, aŭ 5 dolarojn por subtenanta membreco. Pagojn sendu al Stan Cohen, 16 Long Ave., Allston 34, Mass.



Deduktaj Difinoj Por

Parolemaj Papagoj

- Esperanto**, subs. Lingvo, kiun oni uzas por diskuti tiun lingvon. En Usono, precipe limigata al salutoj kaj adiaŭoj. Karakterizata per abundo da prononceblaj mallongigoj.
- Esperantujo**, subs. Mita lando, en kiu oni malpermesas mencii politikon.
- Esperantisto**, subs. Diversspeca vivformo, genre karakterizata per sindediĉo al la gramatikaj principoj de l' universo. Kiam bonhumora, la besto parolas la lingvon **Esperanto** (vidu supre).
- Movado**, subs. La popularigado de la lingvo **Esperanto** (vidu supre) en danchaloj kaj brandejoj, sur strat-anguloj, kaj en kelkaj lernejoj. Ofte klopodata per nekredeblaj rimedoj, kaj rimedata per nekredeblaj klo-podoj.
- Amatoro**, subs. Homo, kiu ne posedas 4,536 oficialajn esperantajn radikojn.
- Diletanto**, subs. Homo, kiu ne posedas 4,536 oficialajn esperantajn radikojn, sed volas paroli.
- Sincerulo**, subs. Homo, kiu ne posedas 4,536 oficialajn esperantajn radikojn, sed volas paroli, kaj sukcesas.
- Poeto**, subs. Homo, kiu kapablas ignori 4,536 oficialajn esperantajn radikojn.
- Konsultaj rilatoj**, subs. Arango, laŭ kiu se vi skribos al organizo A, vi ricevos informon pri organizo B, kaj inverse.
- Interna ideo**, subs. Iu ajn ideo, troviĝanta interne de la kapo de iu **Esperantisto** (vidu supre).
- Deziras korespondi**, v. Serĉas eblecon edziĝi, edziniĝi, translokiĝi aŭ vendi ion.
- Stelo**, subs. Organizo, monero, insigno aŭ libroserio. Kelkfoje memlumanta astro.
- TEJO**, subs. Misliterumo: Teejo. Respondas al "kafejo" en Britujo kaj Oriento.
- Virino**, subs. Ina viro, aŭ vira ino, depende de via metafiziko. Iom rara specio en **Movado**. (vidu supre).
- Instruisto**, subs. Nova **Esperantisto** (vidu supre).
- Centra Oficejo**, subs. Privata domo de movadulo, enhavanta fakigskatolon kaj ruinigitan tajpilon.
- Skatologio**, subs. Studo pri fakigskatoloj.
- Pacienculo**, subs. Abonanto al "Nord-Amerika Esperanto-Revuo".
- Komisiito**, subs. Kompatinda malsaĝulo, kiu montris tro da entuziasmo je malprava tempo.
- Argumenti**, v. Diskuti en la lingvo **Esperanto** (vidu supre).
- Beletra**, adj. Eldonata de sur la Kanariaj Insuloj.

—el JEN-Bulteno, marto, 1963.



"Atak-cirkulero venis hodiaŭ . . .
kial vi ne diris al mi, ke vi iam studis
Interlingva?"

mallongaj notoj

Kristana Esperantista Ligo Internacia nomis nian prezidanton, David Richardson, sia nova usona reprezentanto. Interesatoj pri tiu organizo, kaj membroj de K.E.L.I., bonvenigos tiun novan kontaktpunkton.

Tendaron esperantistan deziras fondi John Kailenta (83 Kenball Ave., Staten Island 14, New York) en la ŝtato Maine. Kiu interesigas pri tiu propono, bonvolu lin kontakti.

Revuon pri Bibliaj Studoj projektas eldoni via redaktoro. Profesiaj fakuloj pri arkeologio, historio, lingvistiko, teologio, kc., bibliaj bonvolu lin kontakti; ankaŭ aliaj personoj kiuj ŝatus aboni tian gazeton bonvolu skribi. Adreso: Donald Broadribb, Dept. of Semitic Studies, University of Melbourne, Parkville, Victoria, Aŭstralio.


Landmarks of a People, de Bernard Postal, estas la nomo de nova libro verkita de la redaktoro de **The Jewish Digest**. Ĉi tiu libro multloke mencias D-ron Zamenhof, la varsovia monumenton kaj lian tombon. Kosto de la libro, \$5.95. Interesatoj kontaktu la aŭtoron ĉe la adreso 3459 Frederick St., Oceanside, New York.

Muzikistoj atentu: W. H. Coventry (ĉe Brita Esperantista Asocio, 140 Holland Park Ave., London, W.11) petas, ke kiu verkis muzikon por esperantaj kantoj, aŭ la kompletajn kantojn mem, bonvolu lin kontakti. Li deziras, prunte aŭ donace, ricevi la muzikaĵojn, prefere kun iom da informo pri la komponinto kaj ĉu la muziko estas publike prezentita, por starigi bibliotekon uzotan de la esperantistaro.

Skolta Ligo: Thomas Haxby, West Fork, Arkansas, akceptis la postenon Deputy Representative de la Ligo en Usono, kaj restas direktoro de la instrua servo de la Ligo. Stuart P. Seidel, Brooklyn, New York, estas nomita administra direktoro pri membreco kaj organizo, de la usona sekcio.

Aperis mimeografita listo de 88 sonbendoj nun haveblaj en la aŭdvida fako de ELNA. Petu la liston de la direktoro, H. K. Ver Ploeg, 1908 E. 8th Ave., Spokane 32, Washington.

Gazetoj kaj ĵurnaloj: Specimenaj tekstoj en Esperanto, Interlingua, kaj la angla aperis en **The Philadelphia Inquirer Magazine**, 5a de majo. **The Grange News**, en la ŝtato Washington, aperigis artikolon pri Esperanto kaj pri David Richardson, la 11an de majo. **The Jewish Review and Observer**, 19 Aprilo, aperigis artikolon "Rumanian Refugee Glad to be in U.S.A." en kiu aperis ankaŭ notoj pri Zamenhof, Esperanto, kaj la ĉijara ELNA-kongreso. Kaj S-ino Wallace Peterson prelegis al la kolegio de la Benedictine Sisters en Mt. Ange, Oregon, pri kio raportis la Abiqua, 26a de marto, per ampleksa artikolo titolita "Esperanto, Rapidly Growing as an International Language." La **Arkansas Presbyterian**, en sia marta numero plene raportis pri Roy kaj Dorothy Holland, kaj publikigis ilian aŭtobiografian skizon el nia Revuo, en Esperanto.



Espero Katolika

Scienca-Teknika Rondo en Grajnoj en Vento estas fondita. La tria eldono por tiu rondo aperos la 1an de septembro. Se vi deziras partopreni tiun strebon akceli la sciencan uzadon de Esperanto, kontaktu Alberto Barrocas, Yaguari 2248, Ap. 3, Montevideo, Urugvajo.

Radio: Prof. Allan Rice, Collegeville, Pa., intervjuigis por dissendo de WIBF-FM, Jenkintownville, norda flankurbo de Philadelphia. Oni dufoje dissendis la intervjuon.

Reklam-agado: ankaŭ pluraj monatoj Paul Golter, respektata ano de Westpoint, Nebraska, decidis serioze konigi Esperanto per la ĵurnaloj. Li pagis reklampacon kaj plenigis ĝin per informo pri Esperanto, kun tekstoj en tri lingvoj: angla (por la gejunularo), germana (por la maljunularo), Esperanto (por ambaŭ). La tekstoj inkludis, i.a., la preĝojn Nia Sinjoro, Saluton Mario, kc. Li per sia reklamagado multe ekscitis la regionon!

kun rideto:-

"Nobody knows, in America,
Puerto Rico's in America!"

(West Side Story)

En la aprila numero de la JEN-Bulteno ni legis, kun rideto, la informon ke JEN estas tut-nordamerika, havante membrojn en tiuj fremdaj landoj Puerto Rico, Costa Rica, kaj Meksikio. Certe neniu diru ke Usonanoj estas imperiemaj, ja ili eĉ forneas sian propran teritorion...

Tio memorigas al ni, ke ankoraŭ en 1962 la UEA-jarlibro listis Havajon kiel sendependan nacion. En la eldono por 1963 Havajo konservas apartan listigon, kun noto "Vidu sub 'Usono'". Ni ne demandos, kial ĝi iam aparte listigis...

recenzeto

Jarlibro 1963 Unua Parto, de la Universala Esperanto-Asocio. Rotterdam, 1963. 511p., broŝ. Ricevata nur de membroj.

La ĉijara jarlibro prezentas progreson plurrilate. Ne nur la pli granda amplekso, kiu indikas la jam sciatan relativan prosperon de la U.E.A., sed rearanĝo de kelkaj partoj de la enhavo plaĉas. Oni evidente klopodis pliaktualigi la enhavon de la diversaj informoj. La gazetara listo estas pli legebla. (Dum 1962-3 U.E.A. ricevis 102 esperantajn gazetojn.

Aperis 8 novaj; mortis 6; 49 estis tutesperantaj.) Ensume, la jarlibro estas bone preparita manlibro pri la esperanta movado, kun adresoj, pri-skribetoj, kc., kiel ankaŭ listo de la proksimume 2600 delegitoj. Pri tiuj lastaj, la statistikisto donis la nombron 3297, sed por atingi tiun numeron kalkulis plurfoje multajn personojn, tiel ke la delegito en North Shields, Britujo, estas kalkulita 5foje!

Kiu ne estas individua membro de la U.E.A., devus serioze konsideri la konsilindecon tiel membriĝi.

de
nia
presisto

Aldone al la artikolo de D. Richardson en la junia numero mi ŝatus rekomendi al aĉetantoj de magnetofonoj, ke ili nepre aĉetu kvar-trakan aparaton, ĉar per tia aparato ili povos ĉion reaŭdigi, ankaŭ tion, kio estis dutrake surbendigita.

La kosto estos eble iom pli alta, sed oni reakiros tiun plian elspezon tre baldaŭ per ŝparita sonbendmaterialo kaj per ŝparitaj poŝtkostoj. Multaj firmoj jam ne plu produktas dutrakajn aparatojn. Havi trian rapidecon de 1½ koloroj/sek. estas ankaŭ tre rekomendinde.

R. EICHOLZ
Komisiito de UEA pri la magnetofona servo.

,,,,,,

Respondoj por Lernu Vortojn

Inundi: ĉ
Embaraso: b
Kompromiti: a
Kamero: a
Heĵti: b
Risorto: b

Ĉiu vorto estas oficiala; la ĝustaj respondoj baziĝas sur la difinoj en **Plena Vortaro**. Se vi erare respondis pri pli ol du el la vortoj, vi grave bezonas pligrandigi vian vortoscion.

De la Sekretario



Multaj hoteloj, restoracioj, kc., senpage disdonas reklamcele poŝtkartojn, por ke la klientoj povu skribi al sia hejmloko. Helpus min, se vi petus ke tiaj institucioj en via loko donu ian ajn kvanton por mia uzado. Tio helpus ŝpari kovertojn kaj paperon, kaj multe plibeligus la komunikojn, kiujn mi devas dissendi. Emfazu ke la firmoj tiel reklamigos en la tuta kontinento kaj eksterlande, sen bezono ke ili pagu por tio!

Gazetoj ricevataj: La Revuo Orienta, majo; Dansk Esperanto-Blad, marto, apr.; Espero Katolika, majo; British Esperantist, majo; SAT-Amikaro, Apr.-majo; Sudstelaro, jan.-feb.; Heroldo, 1 majo; Sennaciulo, majo; Revue Francaise d'Esperanto, majo; Usona Skolta Revuo, Bulletin, Apr.-Jun.; PLI (Esp. Klubo de Los Angeles), unua numero; Bulteno (sama klubo), majo; La Gazeto, 1 jan., 15 jan.; Informilo (Esperantistaj Kamradistoj), apr.; Nia Ligilo (Israelo), apr.; Germana Esperanto - Revuo, majo; El Sol (Kosta Riko): kun serio de lecionoj kaj korespondanonoj, 31 marto; Norvega Esperantisto, no. 4; Nederlanda Esperantisto, apr., majo; Esperanto, majo; Svisa Espero, apr.; Sennaciulo, apr.; Edukado Internacia, feb.; The Esperantist Teacher, dec.; Nia Voĉeto, mar.; Espero Katolika, apr.; Esperanto En Skotlando, printempo; Kvakera Esperantisto, printempo; Revuo Orienta, apr.; JEN-Bulteno, apr.; Nuntempa Bulgario, jan.; Revue Francaise d'Esperanto, apr.; Australian Esperantist, nov.-dec.; Bulgara Esperantisto, feb.; El Popola Ĉinio, no. 2; Heroldo, 16 apr.; British Esperantist, apr.; Bulletin (usona sekcio de SEL), apr.-majo; New Zealand Esperantist, jan.-feb.; Informa Bulteno (Praha), jan.-feb.; Internacia Fervojisto, apr.; La Praktiko, feb.

Alvoko al ĉiuj lokaj kaj regionaj Esperanto-grupoj kaj kluboj, komitatoj, kaj aliaj Esperanto-organizaĵoj en Nordameriko:

Iam en 1962 (la ĝusta monato nun ne gravas), mi petis, ke ĉiuj lokaj kluboj diru al mi, ĉu ili volas partopreni en nova sistemo de cirkulado de la bultenoj de lokaj kluboj. **NUR DU KLUBOJ** eĉ respondis al mia peto! Ĉu la bultenoj de kluboj en aliaj lokoj ne interesas al vi? Ĉu vi opinias, ke vi ne povas trovi helpojn kaj interesajn en ili por viaj klubanoj?

Se vi nun opinias, ke via klubo devus helpi aliajn per mia propono, jen la simplaj agoj, kiujn vi faru:

- (1) Sendu al mi tri ekzemplerojn de via bulteno, eĉ se nur unupaĝa. Poste vi devos sendi pli da ekzempleroj por ke ĝi iru al aliaj kluboj, kiuj sin proponos al la agado.
- (2) Kun tiuj ekzempleroj (aŭ antaŭ ol sendi ilin al mi!) diru al mi, ke via klubo volas esti aktiva en la kunagado de la interŝanĝado de klubbultenoj. Mi vin enlistigos en la aro de kluboj.

Estas du regionaj organizaĵoj esperantistaj en Nordameriko; ambaŭ estas kunlaborantaj kun ELNA: Pacifika Nordokcidenta Esperanto-Kunveno (Usono-Kanado) kaj la Tri-Stata Regiona Esperanto-Komitato (Usona). Mi mem estas ano de la laste nomita kaj povas havigi nian bultenon ("AMIKECO") por la programo. Sendube la alia regiona grupo volos kunlabori kun ni.

Mia originala ideo estis kunfiksi la bultenojn kaj aldoni taŭgan kovran paĝon kaj la kompletan sendi en unu pakajo al ĉiu partoprenanta klubo.

Tute certe tiu via membro, kiu dissendadas vian bultenon, povas fari la iomete ekstran laboron por ni, ĉu ne?

Ho jes! Ne forgesu mencii, ĉu vi volas, ke mi elcitu ajojn el via bulteno por nia **NORDAMERIKA ESPERANTO-REVUO**!!

Korespond - Anoncoj

Brazilo:

Volas korespondi kun usonaj infanoj kaj interŝanĝi poŝtkartojn ilustritajn: F-ino Célia de Lima, Rua Capitas S. de Barros, Caixa Postal 109, Jatai. (13 jara.)

Bulgarujo:

S-ro Juli Penkov, str. G. Genov 22/6, Sofía. (Deziras interŝanĝi poŝtkartojn, bildojn pri kinaktoroj, kaj esperantanojn.)

22 jara studento deziras korespondi pri muziko, sporto, arto, filmoj. Apostol Mangarov, Stara Planina No. 24, Sofía 27.

Francujo:

Anoncojn kaj artikolojn pri edukado sendu en Esperanto al S-ro G. Perra, 145 Avenue Lacassagne, Lyon 3, kiu kontribuas ilin al sia sindikato instruista. Ankaŭ sendu al li anoncojn kaj informojn pri socialaj aferoj por la gazeto **Faim Et Soif** (Malsato kaj Soifo) de l'Abbé Pierre.

Hungarujo:

SzMT. Kulturotthonanak, Esperanto Csoportja, Miskolc, deziras gazetojn esperantajn, kaj aliajn esperantanojn.

Halmagyi Balazs, MSzHT. Esperanto Tanfolyam, Jokai tér 1/5, Mazinebarcika: komencantoj de-

ziras bildkartojn kc.

Indonezio:

Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn: Oey Djoe Tiang, Toko Oey, Karanggetas 29, Tjirebon.

Japanujo:

De aprilo la jurnalo Hyogo Sinbun aperigas elementan kurson pri Esperanto por siaj legantoj. Ni bezonas multajn korespondantojn por la kursanoj. Informu pri nomo, adreso, sekso, profesio, aĝo, interesoj. Skribu al Hyogo Shinbun - sha Esperanto - kurso, Shinkaichi Hyogo - ku, Kobe.

Jugoslavujo:

Dragica Soldo, Zagreb, Boticev TRG 4/11. (Mezaĝa oficistino.)

Acimovic Midomir, Nova Kolonija 28/9, Kraljevo. (UEA-delegito; volas bildkartojn el Usono por sia kolekto.)

Nerlando:

L. J. Wulfers, Lindanusstraat 16, Nijmegen. (Interesiĝas pri esperantaj glumarkoj, uzitaj poŝtmarkoj, amikeco per Esperanto.)

S-ino J. M. Kuil-Roffel, Star Numanstraat 93, Groningen. (Dommastrino, aĝo 53 jarojn; serĉas korespondamikojn.)

JUBILEO

Tro malfrue por aperigo en la konvena numero, ni ricevis sciigon pri la jubileo de William Baff, kiu la 20an de majo spertis sian 75an jarfiniĝon, kaj krome povis fiere diri ke li estas esperantisto jam de 58 jaroj. Ni salutas kaj gratulas tiun nian pioniron.

SENPAGE

Senpagajn ekzemplerojn de pro-
testantaj presajoj en Esperanto oni
povas ricevi de Esperanto-Missionen,
Box 87, Ostansjo, Svedujo.

DONACOJ AL LA REVUO

Glenn Turner \$50

AIRMAIL STICKERS

For a big supply of 250, send \$1 to:

Esperanto League Esperanto Press
808 Stewart St. or Oakville, Ont.
Meadville, Pa. Canada

**BY AIR MAIL
PER AERPOSTO
PAR AVION**



ESPERANTO, INTERNACIA LINGVO

HOW TO SAVE TIME AND WORK FOR OFFICIALS OF THE LEAGUE

Every member, immediately after paying his membership fees, whether new or renewed, receives a copy of the standard membership card shown below. Other than regular membership cards have the appropriate designation typed above the words MEMBERSHIP CARD: student, supporting, etc.

PLEASE REMEMBER that the date after "Valid until" is the time for you to renew your membership, which you should do early in the preceding month to save Mrs. Holland the time and work of reminding you.

—CONRAD FISHER.

No.	Valid until.....
	MEMBERSHIP CARD
ELNA	Esperanto League For North America, Inc.
	<small>AFFILIATED WITH UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO IN CONSULTATIVE RELATIONS WITH UNESCO</small>
<hr/> <p>As an active member, you are urged to join your local Esperanto group or work to establish one, serve as UEA delegate in your locality, attend annual congress of ELNA, and promote the International Language in your area.</p>	
<hr/> MEMBER'S SIGNATURE	 ELNA SECRETARY

FOR YOUR STUDY

we recommend:

A Key to Esperanto (30p.): a summary of grammar, and Esperanto-English vocabulary, easy to slip into your pocket. \$.10.

English-Esperanto Vocabulary (36p.): similar in format to the above. \$.10.

Edinburgh Pocket Dictionary (288p.): a good English-Esperanto and Esperanto-English dictionary. \$1.50.

Step by Step in Esperanto, by M. C. Butler (280p.): a complete textbook of the language. \$2.50.

Teach Yourself Esperanto, by Cresswell & Hartley (205p.): a conventional textbook, with much exercise material. \$2.75.

Esperanto, Your Passport to World Friendship (40p.): a general introduction to Esperanto, its purposes, history, and movement. \$.35.

ESPERANTO GROUPS IN THE UNITED STATES

Listed by State, City, and name of person to be contacted, for further information:

California:

Hillsborough: Peninsula Esperanto League (Mrs. William Schulz, 410 Darrell Road).

Los Angeles: Esperanto-Klubo de Los Angeles (Wm. W. Gienny, 2705 Carlaris Road, San Marino).

Napa: Napa Esperanto Club (Mrs. D. C. Walker, 2846 Monticello Road).

Palo Alto: Esperanto in Palo Alto (P.O. Box 11564, Station A).

Sacramento: Esperanto Society of Sacramento (J. Q. Rickey, 2667 17th St., Sacramento 18.)

San Diego: Esperanto Society of San Diego (Frances E. Helmuth, 5615 Beaumont Avenue, La Jolla (San Diego)).

San Francisco: Esperanto-Societo de San Francisco (SSgt. Barbara D. Colt, 580C Lendrum Road, Presidio of San Francisco).

San Gabriel Valley: Blind Study Group (Mrs. Phillips Neuman, 2736 Cogswell Road, El Monte).

Santa Monica: (Mrs. Blanche Parker, 515 25th Street.)

Illinois:

Chicago: Esperanto Society of Chicago (Mrs. J. N. Denison, 17958 Homewood Ave., Homewood).

Massachusetts:

Cambridge: Harvard Esperanto Club (Quincey House, Box 8, Cambridge 38).

Springfield: Greater Springfield Esperanto Club (Warren H. Gould, 114 Deerfield Street, Greenfield).

Michigan:

Ann Arbor: (Wm. C. Dickerman, 424 Hilldale).

Missouri:

St. Louis: Esperanto Societo de St. Louis (John Sabin, 9 Princeton Place, University City 30).

Montana:

Missoula: Esperanto Study Group (Bob Davis, 1721 Helen).

New York:

New York: The Esperanto Society of Greater New York (50 Overlook Terrace, New York 33).

New York: Esperanto-Klubo de Novjorkurbo (Dr. Julius Balbin, 340 Riverside Drive, Penthouse 2, New York 25).

New York: Esperanto Study Group (Frances Leshner, 4 West 28th Street, New York 1).

New York: Staten Island Esperanto-Pondo (John Kailenta, 83 Kenball Ave., Staten Island 14.)

Oregon:

Corvallis: Oregon State University Esperanto Group (Jean Ann Trout, 507 West Hall, OSU).

Oregon City: Oregon City Esperanto Group (Mrs. Lawrence Winkleman, 4203 S.E. Rothe Road, Milwaukie 22).

Portland: Esperanto-Societo de Portland (ESPO). (Mrs. Evelyn Deer, 12946 N.E. Hancock St., Portland 30).

Portland: Multnomah Esperanto - Stud - Grupo (Tomaso Davidson, 3434 S.W. Marigold St., Portland 19).

Pennsylvania:

Allentown-Bethlehem: Esperanto Club of the Lehigh Valley (Donald Munro, 1961 Erie Ave., Quakertown).

Meadville: Meadville Esperanto Society (Barbara Eberhardt, 681 Hickory St.).

Pittsburgh: Esperanto-Klubo de Pitsburgo (Donald H. McClellan, 333 Macassar Drive, Pittsburgh 36. Phone: (412) 655-7704).

Tri-Stata Esperanto-Informejo and Tri-Stata Esperanto-Bulteno (2736 Locust Drive, Bridgeville).

Texas:

Houston: Esperanto-Klubo de Houston (Edward F. Lacy III, 6923 Schley St., Houston 17. Telefono: WA-6-5702).

Washington:

Seattle: (Vincent Griffeth, 8556 37th Ave., S.W.).

Spokane: (H. K. Ver Ploeg, 1908 E. 8th Ave.).

Tacoma: (Ruth Culberg, 1912 N. Monroe).

Walla Walla: Montvida Esperanto Society (Al Estling, 1351 Grant St.).

National Groups:

Esperanto League for North America, 808 Stewart St., Meadville, Pennsylvania.

Junularo Esperantista de Nord-Ameriko (JEN) (Richard B. Kollin, Apt. 4a, 30 Avenue B., New York 9).

Book Dealers:

Esperanto League Book Service, 808 Stewart St., Meadville, Pennsylvania.

Shorey Book Store, 815 Third Ave., Seattle 4, Washington.

Esperanta Libroservo, 6361 Elmburst Rd., San Diego 20, California.

Esperanto-Library, Middleton, Wisconsin.

Se la supraj adresoj aŭ nomoj ne estas ĝustaj, aŭ se ekzistas aliaj grupoj, bonvolu informi:

S-ino Dorothy Holland (Estro de la ELNA Membreca kaj Organiza Komitato),
1976 Greenview Drive,
Fayetteville, Arkansas.

REPREZENTANTOJ DE ORGANIZOJ

Ci tiu listo tute ne indikas konekton kun E.L.N.A.

Kristana Esperantista Ligo Internacia: David Richardson, RFD Box 81, Eastsound, Washington.

Internacia Katolika Unuigo Esperantista: Eleanor McGrogan, 2109 Parkwood Dr., N.W., Warren, Ohio.

Kvakeria Esperantista Societo: Catherine Schulze, 410 Darrell Road, Hillsborough, California.

Unitara Universalista Esperanto-Societo: Jim Deer, 12946 N.E. Hancock, Portland 30, Oregon.

Universala Esperanto-Asocio, Heroldo de Esperanto, kaj Universala Ligo: Donald Parrish, 328 West 46th St., Los Angeles 37, California.

Internacia Sciencia Asocio Esperantista: William Solzbacher, 6030 Broad St., Brookmont, Washington 16, D.C.

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj: Dorothy Holland, 1976 Greenview Drive, Fayetteville, Arkansas.



THE ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA, INC.



invites you to join in the work of promoting Esperanto as a member of the League. You will receive The North American Esperanto Review, and as an associate member of the Universala Esperanto-Asocio will be entitled to the services of its world network of local and specialist delegates.

The Esperanto League is the only American organization affiliated with the neutral world-wide Esperanto movement as an official "landasocio" of U.E.A.

Esperanto League for North America, Inc.
808 Stewart Street,
Meadville, Pennsylvania.

I enclose a check/money order for \$.....

Please enroll me as a member in the following category (check which):

..... Student Member (under 21; my age is), \$3.

..... Regular Members, \$5.

..... Joint Members*, \$7.

..... Sustaining Member, \$10.

..... Patron Member, \$20.

..... Life Member, \$100.

..... Subscription only, \$3.

*Man and wife; receive one subscription.

NAME:.....

ADDRESS:.....

CITY:..... STATE:.....

DE ALASKO AL MEKSIKIO:

La gazeto por ĉiuj esperantistoj sur la nord-amerika kontinento estas

LA NORD-AMERIKA ESPERANTO-REVUO

Jarabono : \$3 (40 steloj)

Abonu ĉe ELNA
aŭ via landa asocio

Esperanto League for North America
808 Stewart St., Meadville, Pa.